

DEK DU ARTIKOLOJ DE ISAAC NEWTON

PRI DIO KAJ KRISTO

ĈIRKAŭ 1710-1720

KEYNES MS 8, KING'S COLLEGE, CAMBRIDGE

Artikolo 1. Ekzistas unu Dio kaj Patro ĉiamvivanta, ĉieesta, ĉioscia, ĉiopova, la kreinto de ĉielo kaj tero, kaj unu Interulo inter Dio kaj la Homaro, la Homo Kristo Jesuo.

Artikolo 2. La patro estas la nevidebla Dio, kiun neniu okulo estas vidanta aŭ povas vidi. Ĉiuj aliaj estaĵoj estas kelkfoje videblaj.

Artikolo 3. La Patro havas en Si vivon kaj donis al la filo, por ke li havu en si vivon.

Artikolo 4. La patro estas ĉioscia kaj havas ĉian scion origine en sia propra koro kaj komunikas scion pri estontaj aferoj al Jesu Kristo kaj neniu en ĉielo aŭ sur tero aŭ sub la tero indas ricevi scion pri estontaj aferoj senpere de la patro krom la Ŝafido. Kaj tiel la atesto de Jesuo estas la Spirito de Profetaĵo kaj Jesuo estas la Vorto aŭ Profeto de Dio.

Artikolo 5. La patro estas nmovebla, nenia loko kapablas fariĝi pli malplena aŭ plena de li ol ĝi estas pro la eterna neceso de naturo. Ĉiuj aliaj estaĵoj estas moveblaj de loko al loko.

Artikolo 6. La tuta adoro (ĉu preĝo, laudo aŭ dankesprimio) kium oni ŝuldis al la patro antaŭ la veno de Kristo oni ankoraŭ suldas al li. Kristo ne venis por malpligrandigi la adoron de lia patro.

Artikolo 7. Preĝoj estas plej efikaj kiam oni direktas ilin al la patro en la nomo de la filo.

Artikolo 8. Ni devas redoni dankon al la patro sole ĉar li kreis nin kaj li donas al ni nutraĵon kaj vestaĵojn kaj aliajn benojn de ĉi tiu vivo kaj pro kio ajn ni devas kanki lin aŭ deziras, ke li faŭ por ni, ni petas lin senpere en la nomo de Kristo.

Artikolo 9. Ni ne bezonas preĝi al Kristo, por ke li propetu por ni. Se ni preĝas ĝuste al la patro li propetos por ni..

Artikolo 10. Ne necesas por savo, ke ni direktu niajn preĝojn al iu ajn krom la patro en la nomo de la Filo.

Artikolo 11. Doni la nomon de Dio al Anĝeloj aŭ Reĝoj ne estas kontraŭ ka unua ordono. Doni la adoron de la Dio de la judoj al Anĝeloj aŭ Reĝoj estas kontraŭ ĝi. La signifo de la ordono estas: Vi adoru neniajn aliajn Dojn krom mi.

Artikolo 12. Por ni estas unu Dio, la patro, el kiu estas ĉio, kaj ni por li, kaj unu Sinjoro Jesuo Kristo, per kiu estas ĉio kaj ni per li. Tio signifas, ke ni devas adori nur la patron sole kiel Dion Ĉiopovan kaj Jesuo sole kiel la Sinjoron la Mesion, la grandan Reĝon, la Ŝafidon de Dio, kiu estis mortigita kaj kiu elaçetis nin per sia sango kaj faris nin reĝojn kaj Pastrojn.

Tradukita de John Boulton

Esperanto